

Laborista Esperantisto

15DE JAARGANG No. 3 — 6 MAART 1946
OPLAAG 4000 EXEMPLAREN PER MAAND
ABONNEMENT f 2.25 PER JAAR. LOSSE NUMMERS f 0.20. VOOR LEDEN GRATIS

Adres Redactie, Administratie en Secretariaat van de Federatie van Arbeidsers-Esperantisten:
Postbus 8002, Amsterdam-West
Postgiro Amsterdam 111278

ORGAAN VAN DE FEDERATIE VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

TUTMONDA PETSKRIBO

En nia lasta antaŭmilita kongreso ni traktis proponon de sekcio Haarlem por aranĝi internacian petskribon por la enkonduko kaj oficialigo de Esperanto. En la oktobra kongreso ni nun denove tuŝis la problemon kaj ni atentigis la kongreson, ke ni jam havis certajn planojn.

Ni ankoraŭ ne prezentis niajn ideojn, ĉar la rekonstruado de la Esperanto-movado ankoraŭ ne estas plenumita; i.a. mankas ankoraŭ kontakto kun multaj landoj kaj krome pluraj asocioj apenaŭ reaktiviĝis kaj la sukceso dependas de tio, ĉu la movado povos sufiĉe energie kaj universale plenumi la taskon.

Ĉe la ellaboro de niaj planoj ni atentis diversajn flankojn kaj kvankam kompreneble ĉiam restas iaj punktoj, kies gravecon oni ne taksas ĝuste, ni tamen kredas, ke nia plano estas sufiĉe zorge kunmetita, almenaŭ por povi servi kiel bazo por internacia pensinterŝanĝo kaj por la unuaj laboroj, ligitaj al tio.

La kerno de nia ideo estas, ke la influo de la Esperanto-movado ne estas limita per la nombro da esperantistoj, sed ke ĝia signifo estas pligrandigata de la simpatio de multaj miloj da homoj, kiuj, kvankam ili ial ne povas aŭ ne volas per lernado de Esperanto mem aktiviĝi, plene substrekas niajn ideojn kaj volonte konsentus pri la oficialigo kaj enkonduko de Esperanto.

Apud nia ordinara propagando, direktita al la esperantistigo de la simpatiantoj ni devas plifortigi la ĝeneralan simpation al nia afero kaj utiligi ĝin por devigi la registarojn akcepti la enkondukon kaj oficialigon de Esperanto.

Antaŭ ĉio necesas, ke ni fondu instancojn nacie kaj internacie por oficiale gvidi tiujn ĉi laborojn, ĉar ĝi ne estas afero de unu lando aŭ de iu grupo de esperantistoj, sed de ĉiuj kaj ĉiaj esperantistoj.

En Nederlando ni jam havas instancon por tia agado, nome: la Nederlanda Centra Komitato Esperantista, kaj similajn instancojn ni kreu ankaŭ en aliaj landoj kaj specon de Internacia Centra Komitato.

La Internacia Centra Komitato povos en kunlaboro kun la naciaj komitatoj decidi pri la agado.

La gvidinstancoj devos atenti tri gravajn punktojn: 1e la formulado de niaj postuloj, 2e la propagando por niaj postuloj kaj 3e la aranĝo de petskribo. Nia spaco en „Lab. Esp." ne permesas al ni detale publikigi la diversajn flankojn de tiuj ĉi tri punktoj. Sed, se ni rememoras, ke ni rimarkis, ke diversaj soldatoj de la aliancaj armeoj, kun kiuj ni konatiĝis ankoraŭ ne scias pri la ekzistado de Esperanto, ĉiu komprenas, ke la plena ellaboro de niaj planoj postulos sufiĉe grandan kaj longdaŭran fortostreĉon kaj ke la petskribo, kiu devos esti la krono de nia laboro ne povos esti entreprenata en la venontaj tri monatoj kaj se ni atentas, ke ni ĝis nun ankoraŭ ne sukcesis akiri eĉ la plej suprajan kontakton kun landoj, kiaj Ruslando, Ĉinio k.t.p. ĉiu komprenas, ke eĉ la unuaj paŝoj postulos sufiĉe da tempo.

Tamen IEL, la neŭtrala internacia organizo ne komprenas tion. En januaro ni ricevis cirkuleron de IEL, petantan nian kunlaboron por petskribo al OUN, la Organizo de la Unuiĝitaj Nacioj.

Principe la propono ne povis esti malsimpatia al ni, ĉar plurrilate ĝi kongruas al niaj propraj planoj. Tamen ni devis rifuzi la kunagadon, ĉar la plano de IEL montras gravajn mankojn. Montriĝis el la cirkulero, ke oni intencas senprokraste kolekti subskribojn. Tio estas tute erara. Ni povas tuj kolekti kelkajn milojn da simpatiesprimoj, sed por akiri milionojn ni devas funde prilabori la terenon kaj nur, se la petskribo estas vere amasa, ni povas esperi ian sukceson. La dua manko konsistas en la nebula teksto de la subskribota deklaro. Ĝi tekstas: *Sekve de la tutmonda uzado de Esperanto, la sola tia lingvo, kiu trafis rimarkindan sukceson, mi esperas, ke la Unuiĝitaj Nacioj ĉiel helpos disvastigi la uzadon de ĉi tiu lingvo: ekzemple per ĝia instruado en lernejoj, kie estas taŭgaj instruistoj, kaj per ĝia uzado en turismo, internacia komerco kaj korespondado.* (sekvas nomo, subskribo k.t.p.).

Tia teksto estas ĝuste taŭga por prezenti bonan okazon por formeti nian proponon en la forgesujon kaj por tio ni ne intencas elspezi monon kaj energion. Iagrade ni devas kompari nian laboron en tiu ĉi direkto kun militado kaj ni dezirus konsili al IEL, ke ĝi iam studu la strategion de Montgomery ĉe El Alamein. Ni dubas, ĉu tiu batalo estus finiĝinta same, se ankaŭ Montgomery estus atakinta tiom senprepare kaj trorapide. Ni lernu eĉ el militado!

Fine la agado de IEL estas unuflanka, oni malatentas la fakton, ke nur kelkaj landoj jam povas komenci la agadon kaj plie ĝi estas prezentata kiel IEL-afero, sen atente al grandaj grupoj, kiuj ne agadas en la kadro de IEL. Sur la deklaro troviĝas la nomo de IEL kaj oni (IEL) aldonis en la cirkulero, ke IEL pagos la kostojn por presigo de la deklaroj en la koncerna nacia lingvo, sed la formato restu neŝanĝita (tio estas tute ĝusta) kaj restu la nomo de IEL.

Tio ne estas la ĝusta maniero por komenci komunan agadon. Ni alte taksas la geston de IEL, ke ĝi konsentos pagi la presigon de la deklaroj, sed ni ne deziras akcepti tion. Ni plene pretas mem laŭpove partopreni la financajn konsekvencojn, sed ni deziras ankaŭ mem partopreni la decidojn, kaj agado en la kadro de IEL estas por ni tute egala al agado en la kadro de alia internacio aŭ mondorganizo, kun kiu ni ne havas rektajn rilatojn.

Ĉu la **neŭtrala** movado partoprenus sur sama bazo agadon de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista aŭ de la LEA-komitato de SAT? La mon-

NOVAJ TEMPOJ

Okazis antaŭ duo da jaroj. Estis malnova, maljuna esperantisto. Inteligenta homo, kapabla oratori. Li bone posedas la lingvon Jes, antaŭ du jaroj. Mi hazarde renkontis lin. Nia intervidiĝo, kvankam ĝojiga, havis iom da melankolio. La teruraj travivitaj momentoj verŝajne kaŭzis tion. Ia neesprimebla sento regis nin ambaŭ. Nia interparolado temis komence pri niaj malfacilaj vivkondiĉoj kaj fine tuŝis nian esperantan vivon.
Mia konulo ne malkaŝis sian malĝojon pro tio, ke siatempe li dediĉis tiom da tempo eĉ mono al la movado — kaj ĉio vane li diris! Neniam plu li ankoraŭ ion faros por kio ajn ideala movado aŭ partio.
Kaj intertempe la terure miserplenaj tagoj forpasis. Finiĝis la milito kaj la vivo reprenas iom post iom sian normalan funkciadon. Sur la esperanto-tereno la aktiveco ankaŭ montriĝas. Sekcioj kaj rondoj regrupiĝas kaj la movado ĝenerale reprenas formon.
Neeviteblaj rezultoj sekvas kaj tute neatendite mi ĉeestis antaŭ kelkaj semajnoj, ian esperantistan kunvenon.
Vidu mian miron. Mia konulo, supre citita, parolis. Kiel jaroj antaŭe, la samaj flamaj paroloj plenaj je konvinko. Bone elektitaj vortoj, delikate formitaj frazoj; vere elokventplena oratoro. O! la indiferentulo. Post lia majstra parolado mi alproksimiĝis kaj kortuŝite manpremis lin. Li ridetis kaj iom mallaŭte, kvankam konfesante, li diris. Novaj tempoj karulo. Mi estas denove kaptita en la reto de nia komuna idealo.
Intertempe okazis en nia regiono festo por honorigi la memoron de la Zamenhofa naskiĝtago. Ne estas mia rolo raporti pri ĉi tiu festo sed mi ne povas nenion diri pri la propaganda flanko. La salono, plenplena konsistis plej parte el gejunuloj.
Dum tiu festo en aparta angulo, kunvenis reprezentantoj de la valonaj kaj flandraj laboristaj esperantistoj.
Principe ili unuanime konvinkiĝis pri la neceso ne nur havi konstantan kontakton, sed ke ankaŭ ili havu komunan landskalan laboron. Tiu realiĝo faciligus demarŝojn ĉe la oficialaj instancoj.
La tutlandra kunveni kiu okazis la 20an de januaro 1946 detale pritraktis tiun problemon.
Vere, novaj tempoj venis kaj alportis samtempe novajn devojn.

Mortiers

Flandrio, januaro 1946

(Daŭrigo de paĝo 1).

do estus tro malgranda por ampleksi la protestojn, sed IEL entreprenas ion tian, kvazaŭ tio estas tute natura afero. En la neŭtrala movado, almenaŭ ekster Nederlando, regas ankoraŭ la ideo, ke la neŭtrala movado estas la oficiala kaj la aliaj formas FAKAJN organizojn. En unu el la numeroj de Lingvo Internacia, la organo de IEL, jam esprimiĝis la ideo, ke la faka movado (t.e. ni kaj la aliaj tendencaj organizoj) partoprenu en la kadro de IEL. Ni ŝatus ekzempligi al IEL la prudentan kaj realisman sintenon de ĝia nederlanda sekcio LEEN, kiu jam dum pluraj jaroj tre agrable kaj harmonie kunlaboras kun ni kaj aliaj organizoj sur bazo de egaleco kaj interrespekto.
Resume ni deziras diri, ke ni ŝatus partopreni en ia kunlaboro kun IEL kaj aliaj organizoj por la supre menciitaj ideoj, sed **demokrate** kaj **serioze.**

W. F. KRUIT.

Proponaro por la 27a kongreso

KOTIZO.

1. Propono Fed. Estraro.
La kongreso fiksu jenajn kotizojn:
a. sekciaj membroj f 0.25 monate
b. s.m. geedzoj f 0.40 monate
c. ĝeneralaj membroj f 3.60 jare *)
d. ĝen.m. geedzoj f 6.— jare *)
e. simpatiantaj membroj f 3.— (min.)
f. simp. membr., org.oj f 5.— (min.)
La sumoj por Belgio estu respektive:
a. 4 bfr.; b. 6,5 bfr.; c. 60 bfr.*); d. 100 bfr.*); e. 50 bfr.; f. 100 bfr.
*) distrikta kotizo inkluzivas

DISKUTOJ.

2. Propono sekcio Heiloo.
Ĉe traktado de propono la proponinta sekcio havu kiel unua la rajton priparoli sian proponon kaj poste respondi la diversajn sekciojn.
Se eble, la propono validu jam en la proksima kongreso.
Rim. fed. estraro: Tiu eblo jam antaŭe ekzistis.

REGULARO.

3. Propono sekcio Utrecht.
La nomo de nia federacio estu:
Federacio de socialistaj esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo.
Federatie van socialistische esperantisten in het gebied van de Nederlandse taal.
Klarigo: La nuna nomo ne esprimas nian rilaton al la socialismo. Estiĝas ĉe kelkaj anoj emo al neŭtralismo aŭ moderigo de nia tendenco. Venas en kelkaj sekcioj novuloj, kiuj fakte estas neŭtralaj esperantistoj, pensante, ke la pravo de nia aparta ekzistado estas en la laboristaro (la socia tavolo laborista). La nuna nomo mistifikis ilin kaj donas al ili moralan subtenon por gvidi la sekciojn al neŭtralismo, se ili akiras gvidajn postenojn en nia organizo.
Rim. fed. estraro: Vidu la raporton de la regular-komitato.

4. Deziresprimo sekcio Den Haag.
La ĝeneralaj anoj aliĝu al distrikto, en kiu estas ilia loĝloko, por ke ili estu reprezentataj en kongresoj de delegito de tiu distrikto.
Klarigo: Ĉar precipe en la lasta kongreso montriĝis, ke la paroladoj de ĝeneralaj membroj forrabas tro da tempo.
Rim. fed. estraro: vidu huish. reglement art. 15. (novan).

5. Deziresprimo sekcio Utrecht.
Urbaj kaj provincaj distriktoj povas okupi sin pri la propagando en najbaraj regionoj, se la koncernata najbara distrikto konsentas.
Klarigo: Ekzistas lokoj, kiuj estas pli facile atingeblaj el najbara distrikto ol el la propra. Ekzemple Vianen kaj Culemborg estas facile atingeblaj el Utrecht, sed ili apartenas al aliaj distriktoj.
Rim. fed. estraro: Nenio kontraŭ.

PROPAGANDO

6. Propono sekcio Haarlem.
La Kongreso petas al la Fed. Estraro — en kunlaboro kun la „Komitato por Esperanto en la lernejo" — esplori la eblon kaj la dezirindon aranĝi grandskalan enketon ĉe la gepatraj komisionoj en la tuta lando, por ke Esperanto estu unu el la nedevigaj fakoj en ĉiuj nederlandaj lernejoj.
Klarigo: Por atingi la celon „Esperanto en la lernejo" estas la unua paŝo, ke la lernejo havu la rajton instrui Esperanton ne ekster, sed dum la lernejaj horoj. Sukcesinta enketo estos grava helpo por atingi tion.
Rim. fed. estraro: Ni transdonu al la komitato „Esperanto ĉe la instruado" por efektivigi.

INTERNACIAJ RILATOJ.

7. Propono sekcio Haarlem.
La kongreso petas la estraron de la Federacio esplori la eblon kaj eventuale fondi el kaj super la diverslandaj laboristaj Esperanto-organizoj novan internacian komitaton.
Klarigo: Ĝis nun fakte la landaj Esp.-organizoj sufiĉis, ĉar ne ekzistis internacia mondorganizo, al kiu ni povus turni nin por internaciaj aferoj. Post la fondo de U.N.O. ekzistas tia organizo, kaj do ankaŭ la esperantistoj bezonas internacian organizon, por ke ni povu agi en la nomo de la tuta laborista esperantistaro.
Rim. fed. estraro: Jam ekzistas la L.E.A. komitato en S.A.T.

8. Propono sekcio Rotterdam-III.
Ĉiu federaciano havas la rajton aliĝi, krom al S.A.T., al ajna mondorganizo laŭprefere.
Klarigo: Neniu landa federacio de labosistaj esperantistoj aplikas eksterstatutan rezolucion por elpuŝi ĝenajn elementojn, escepte de la nederlanda. En la 26a kongreso la aplikon de tia rezolucio la landa estraro nomis „medikamento", do rimedo aplikinda en apartaj kazoj, ne daŭre. Cetere la statuto kaj regularo (artikolo 8 c kaj 9 c) estas rimedoj por ne toleri organizon en organizo aŭ personojn, kiuj malamikas al la federaciaj principoj.
S.A.T., kiu estis multe pli grave trafita de la opozicio, simple aplikis paragrafon 8an el sia statuto, kreante nenian apartan por elpuŝi ĝin.
Rim. fed. estraro: ni atentigas pri la akcepto de la amendo Emmercompascum en la antaŭa kongreso.

KASKONTROLO.

9. Propono sekcio Amsterdam-III.
Por eviti la ĉiam revenantan malfacilajon de elekto de laŭmetia sperta kaskontrolkomisiono ni proponas, ke la kongreso elektu por unu fojo tiun komisionon, konsistantan el tri personoj, el kiuj minimume du estu administracie kapablaj personoj. Laŭ listo oni numeru la personojn 1 — 2 — 3. Post unu jaro numeru 1 eksiĝu el la komisiono kaj oni bezonas nur elekti unu novan komisionanon. Post du jaroj eksiĝas numero 2 kaj oni denove elektu unu novan anon por la komisiono.
Klarigo: Laŭ tiu ĉi metodo oni ĉiam havas kapablan instituton. Cetere oni ne bezonas esplori pri la kapableco de la elektota komisionano, ĉar en la unua jaro li povas observi kiel la du malnovaj funkciuloj faras la laboron kaj jam en la sekvonta jaro li apartenos al la spertuloj kaj en la tria jaro li eĉ havos la gvidadon en la komisiono.
Rim. fed. estraro: La sistemo estas akceptinda.

JUNULARLABORO

10. Propono sekcio Rotterdam-IV.
Nia organizo akceptu la proponon de la nederlanda kaj belga sekcioj de Tutmonda Junular-Organizo aranĝi la porjunularan Esp.-laboron en intima kunlaboro.
Klarigo: La junulara laboro en la kadro de nia organizo antaŭ la milito ne plena kontentigis ĉiujn, nek donis la atenditajn rezultatojn, kaj en la nuna stato de necerteco pri la irendaj vojoj ne estas fruktodona. La konsiderata eblo transdoni tiun laboron grandparte en la manojn de nespecialaj por-Esperanto-junularorganizoj certe ne donos tiujn rezultatojn, kiujn ni nepre atingu sur la junulara tereno.


OP TEN CONGRESSE!!

Ons 27ste staat voor de deur. Wederom maken wij ons op om gesaamlijk de belangen van onze organisatie te bespreken, om ons werkprogramma vast te stellen, en om bijeen te zijn in Esperantio, het land dat ons dierbaar is uit meer dan één oogpunt. Het land dat niets gemeen heeft met imperialisme of gebiedsuitbreiding noch met levensruimte of expansie-mogelijkheden, doch slechts met een geestelijke en ideële voltrekking van een volksgemeenschap, waarvan ook onze Federatie een deel uitmaakt. Over grenzen en oceanen strekt zich ons verlangen uit naar deelgenootschap met gans het volk op geheel de aarde. Niet verdeeld in stukken en brokjes, geïsoleerd en beperkt in haar mogelijkheden, zich beknottend en verdelend door het gebrek aan een gemeenschappelijke taal, door gebrek aan de mogelijkheid tot begrijpen en verstaan. *Weg* de obstakels, die een rechtstreeks contact onmogelijk maken, *weg* de scheidingslijnen, die de kiemen van een nieuwe oorlog met zich dragen, *weg* de verdeeldheid der volkeren. Het behoort tot onze taak de grondslag te leggen der verwezenlijking van dit ideaal. Onze organisatie vertegenwoordigt een deel van dit daadwerkelijk streven. In onze congressen culmineert het overleg der organisatie tot de daad.

Op ten congresse! Ons 27ste staat voor de deur, en we willen haar beleven, beleven en meemaken. Wij willen deelnemen aan het werk. Ieder zijn taak, en ieder zijn deel. Wij willen mede demonstreren en uiting geven van dat, wat ons begeestert en leidt, wij willen mede bouwen aan een betere toekomst, mede bouwen aan de mogelijkheid om de vrede te verzekeren.

Het belooft een bijzonder gedenkwaardig congres te worden. Onze organisatie heeft zich ten dele hersteld na de oorlog. Belangrijke besluiten zijn te verwachten. Besluiten, die voor de verdere ontwikkeling van onze beweging van grote waarde kunnen zijn. Ons voor-congres in Amsterdam, in October l.l. heeft de weg geëffend. Samenwerking werd reeds verkregen met de andere esperanto-organisaties in Nederland. Eenheid in de Esperanto-Examen Commissie is tot stand gekomen. De eerste bijeenkomsten van het bestuur van het nieuwgevormde „Centraal Comité van de Esperantobeweging in Nederland" hebben reeds plaats gevonden. Een oproep tot versteviging van de rijen der georganiseerde esperantisten is verschenen. Meer en meer herstellen we de gaten die de oorlog in ons organisatorisch apparaat geslagen heeft. Ook het contact met onze belgische kameraden begint vaster vormen aan te nemen. Wij hopen, dat ook zij op ons congres vertegenwoordigd kunnen zijn. Ons bestuur stelt pogingen in het werk om hun deelneming mogelijk te maken.

Hoewel we ons van de oorlogsweeën nog niet geheel hebben hersteld, mogen wij toch wel veronderstellen, dat velen er in zullen slagen om de hindernissen te overwinnen en ons 27ste zullen bezoeken.



Het Murmellius-gymnasium, binnen welks muren ons congres zal plaats vinden.

Weer deelnemen aan ons traditioneel Paascongres is een dubbel genoegen. Wij zullen weer enkele dagen in Esperantio doorbrengen. Oude bekenden en medestrijders ontmoeten.... en ook missen. Inderdaad, maar wij zullen werken in hun geest als we daar te samen komen, en we zullen ons één voelen **ook met hen**, gebonden door ons ideaal.

Ook de nieuwe leden zullen daar kennis maken met het intense leven van onze organisatie. Onze congressen worden in het Esperanto gehouden, maar juist daarom zijn zij ook voor hen zo leerzaam. Wekt hen op deel te nemen, leidt hen binnen in onze familiekring.

Kameraden, ons 27ste belooft goed te worden en zelfs meer dan dat, als wij al het mogelijke in het werk stellen om de nog resterende hindernissen te overwinnen en uit de weg te ruimen. Alkmaar maakt zich gereed ons te ontvangen.

Op ten congresse!!

Kiam la propono estos akceptita, la sekcioj de nia organizo sole aŭ en kunlaboro, kun, aŭ tute, lasas la prizorgon de la junulara laboro al la du landoj sekcioj, la nederlanda kaj la belga de T.J.O.
Rim. fed. estraro: Ni unuflanke emas interrilati kun la ne-esperantistaj junularorganizoj, aliflanke ni inklinas konsideri subtenon al T.J.O., se eblas arangô kun tiu organizo, per kiu ĝi estas en la kadro de la organizita esp.-movado, kaj sub ĝia kontrolo.

11. Deziresprimo sekcio Rotterdam-III.

La Federacia Estraro serĉu, ankoraŭ pli intense ol antaŭe, interrilatojn kun junular-organizoj nederlandaj, klopodante atingi per tio, ke tiaj organizoj akceptu Esperanton en siaj programoj.
Klarigo: Konsiderante la tre malfacilan taskon kaj la rezultatojn ĝis nun atingitajn per memarangôj de la infankursoj kaj-grupoj por Esperanto, kaj opiniante, ke en la federacia kadro ni ankoraŭ ne disponas pri la bezonataj rimedoj por allogi kaj teni la junularon de 14- ĝis 20-jarulo,
ni opinias, ke estas konsilinde por pli favore laboradi inter la junularo por Esperanto, provizore lasi ankoraŭ la aranĝojn por la junular-organizado, kurso(j) aŭ grupo(j), en mano de la ekzistantaj junular-organizoj, zorgante, ke nia organizo estu — eventuale en kunlaboro kun la aliaj landaj organizoj — la konsilanto pri Esperanto-kursoj k.t.p., kaj la liveranto de la gvidaj fortoj, materialo kaj ceteraj bezonajoj.
Rim. fed. estraro: Vidu rimarkon sub propono 10.

PRELEGVOJAĜA SERVO.

12. Propono sekcio Groningen.

La Federacia Estraro konsideru la eblon pri restarigo de la prelegvojaĝa servo.
Klarigo: Same kiel antaŭ 1940a, ankaŭ nun kontakto kun alilandanoj estas necesa kaj utila por la interna misio.
Rim. fed. estraro: Ne eblas tuja efektivigo.

EKZAMENOJ.

13. Propono sekcio Leeuwarden.

La Federacio interkontaktu por meti mezan diplomon inter A kaj B.
Klarigo: la studo por B estas tro malfacila. Pro tio la studemuloj haltas ĉe A. Se ekzistus ia meza pli facile akirebla diplomo inter A kaj B, la studemo pli grandiĝus kaj la B-diplomo estus pli facile akirebla.
Rim. fed. estraro: Ŝajnas al ni ne praktika.

LITERATURO

14. Propono sekcio Schiedam.

La Federacio organizu en kunlaboro kun la aliaj landaj organizoj premio-konkurson por noveloj por akiri plej bonan originalajn novelojn en Esperanto. Tiucele oni fiksu limon koncerne la nombron da vortoj. La temo estu libere elektebla de la aŭtoro. Partopreno estu senpaga. La juĝa komisiono formiĝu el la landoj organizoj, kaj konsistu, se eble, ankaŭ el kelke da personoj el la ne-nederlandlingva regiono. Okaze de premiiĝo la aŭtoro cedu la rajton por publikiĝo al la supre nomita komisiono.
La plej bonajn novelojn oni publikiĝu. El la eventuale el tio rezultantaj saldoj la komisiono disponigu premion, se eble unuan kaj duan premiojn.
Klarigo: 1e Bonaj romanoj kaj noveloj de nederlandaj aŭtoroj estas tre maloftaj.
2e Aranĝo de tia premio-konkurso estas, unue, bona propagando, due, ĝi instigas multajn okupi sin pri verkado.
3e Per aranĝado de tiaj konkursoj oni ekhavas pli ĝustan kaj pli klaran imagon pri la lingva kapablo de la nederlandaj esperantistoj.
4e Samtempe oni akiras konvenan pliriĉiĝon de la Esperanta literaturo, pri kiu ĝojos ĉiu esperantisto.
Rim. fed. estraro: Principe nenio kontraŭ, sed praktike estas multaj malhelpoj.

N.C.K.E.

15. Propono M. Leereveld (ĝen. ano).

En la fondita „Nederlanda Centra Komitato Esperantista" la federacia(j) reprezentanto(j) ne rajtas, sen aprobo de la Federacia Kongreso, doni sian apogon al, nek kunlabori en aranĝoj, kiuj estas nekonformaj al la principoj de la Laborista Esperantismo.
Rim. fed. estraro: Ĉi tiu propono esprimas malfidon al la fed. estraro.

VOĈDONADO

16. Sekcio Amsterdam-III.

La kongreso elektu estontece la voĉdonkomisionon el la federacianoj, kiuj ĉeestas kiel gastoj. Ŝajnas al ni nebona metodo formi tiun ĉi komisionon el la gedelegitaro.

Kelkfoje okazis, ke unu el la delegitoj de iu sekcio devas sin okupi pri la tempo-raba voĉkalkulado meze de priparoloj, kiuj forte koncernas la interesojn de lia sekcio, pro kio li ne havas okazon interkonsili kun sia kundelegito.
La delegitoj povu sekvi seninterrompe la priparolojn.
Rim. fed. estraro: Nenio kontraŭ.

17. Propono M. Leereveld. (ĝen. ano).

Por havi demokratan voĉdonadon en niaj kongresoj, ĉiu sekcio antaŭe fiksu pri ĉiuj propono kaj amendo la voĉojn por, kontraŭ kaj neŭtralajn. Konforme al tio la delegito devas doni en la kongreso por ĉiuj proponoj, kaj amendoj la respektivajn nombrojn de por-, kontraŭ- kaj neŭtralaj voĉoj.
Klarigo: Povas tre facile okazi, ke laŭ la ĝisnuna voĉdonmetodo iu propono estas akceptata, kvankam la plimulto de la anaro estas kontraŭ, resp. por ĝi. Por eviti tiajn eventualajojn, kiuj estas malĝustajoj, necesas procedi laŭ la maniero formulita en ĉi tiu propono.
Rim. fed. estraro: Kial ni kongresus se la kongreso akceptas?

REZOLUCIO

18. Propono M. Leereveld. (ĝen. ano).

La Kongreso malaprobu la rezolucion pri mondorganizo, akceptitan en la 26a kongreso, tial ke ĝi devigas al la Federacio esti ligita kun tiu organizo, kiu sin okupas same pri intern. per-laboro kiel pri intern. por-laboro.
Klarigo: Laŭ la koncerna rezolucio la Federacio ne povas daŭrigi la ligon kun S.A.T., ĉar la Götenburga Konvencio priskribas, ke S.A.T. principe plenumu la taskon de per-Esp. laboro, kaj la landaj asocioj principe tiun de por-Esp. laboro.
Rim. fed. estraro: La proponinto malatentas la L.E.A. komitaton en S.A.T.

GAZETAR—SERVO

19. Deziresprimo sekcio Rotterdam-III.

La Federacia Estraro klopodu en kunlaboro kun aliaj landaj organizoj eldoni ĉiumonatan bultenon nederlandlingvan por la gazetaro, se necese ankaŭ en kunlaboro kun la distriktoj.
Klarigo: Ĉar ĝenerale la gazetaro apenaŭ atentas Esperanton, tia bulteno servu por regule informi ĝin pri la tutmonda disvastiĝo de Esperanto.
Rim. fed. estraro: En federacia kadro ni jam laboras por tio.

DIVERSOJ.

20. Deziresprimo sekcio Amsterdam-X.

Ni konstatas, ke nuntempe ofte okazas grandaj kunvenoj aŭ manifestadoj, en kiuj venas la laboristaro. En tiuj okazoj ĉiam multaj organizoj propagandas por siaj interesoj. Neniam ni vidis tie ian propagandilon pri aŭ por Esperanto.
Pro tio ni deziras, ke la Fed. Estraro en la estonteco interrilatu kun la lokaj distriktaj aŭ sekciaj estraroj por disdoni flugfolietojn k.t.p. en tiaj kunvenoj.
Klarigo: La nura verda-monato-propagando ne sufiĉe valoras; ĉiutage ni kaptu la okazon por tion fari kaj cetere la eventuale novaj ĝekursanoj ne plu bezonos atendi ĝis komenciĝo de la novaj elementaj kursoj. Ili ja povas, se ili deziras, ĉiumomente ekstudi Esperanton pere de la nunaj skribaj kuroj.
Rim. fed. estraro: Tio koncernas la agadon de la distriktoj kaj sekcioj. La landaj aferoj havas nian atenton.

21. Propono sekcio Haarlem.

La sekcio Haarlem invitas la Federacion okazigi la venontan kongreson en Haarlem, prefere je Pentekosto.
Rim. fed. estraro: Pentekosto jam montriĝis ne praktika.

22. Amsterdam-V kandidatigas k-don Koeman por la Fed. Estraro.

23. Rotterdam-I kandidatigas k-don H. W. Alings por la Fed. Estraro.

VAN DE LIBRO-SERVO

La fed. estraro proponas ĉi suban tekston por art. 14 de la Huish. Reglement.

Art. 14. De Bond exploiteert een boekendienst (Libro-Servo) voor de uitgave en verkoop van Esperanto-literatuur en wat dies meer zij.
De commerciële leiding van deze dienst berust bij een commissie, benoemd door het bondsbestuur onder verantwoording aan de bondsraad en het congres.
Eventuele baten uit deze dienst komen ten goede aan de bond onder voorbehoud van goed koopmanschap.
De financiële verslagen van de Libro-Servo worden gepubliceerd in het bondsorgaan.

KASRAPORTO pri la jaro 1945a

Enspezoj.	Efektiva Rezultato
Kotizo sekcia	ƒ 2.903.83
Kotizo ĝen. membroj	ƒ 221.40
Abonoj Laborista Esperantisto	ƒ 65.65
Abonoj La Progresanto	ƒ 69.90
Profito L.S.	ƒ 1.500.—
	ƒ 4.760.78

Ĉar la Federacio akceptis la respondecon pri la antaŭmilita ŝuldo al nia presejo „Dico", la antaŭpreparita bilanco montris negativan kapitalon, kiu negativa kapitalo sanĝiĝis en aktivan kapitalon pro la profito L. S. kaj transpreno de la L. S. de parto el la salajro funkciulo. Tiel estiĝis profita saldo.

Elspezoj		Efektiva Rezultato
Preskostoj L.E. ktp.	ƒ 1.866.60	
Ekspedkostoj L.E.	ƒ 127.29	
		ƒ 1.993.89
Red. kostoj La Progesanto		ƒ 1.—
Administracio		ƒ 318.44
Kunvenoj N.C.K.E. ..	ƒ 31.—	
Estrarkunvenoj	ƒ 93.80	
		ƒ 124.80
Kongreso en Amsterdamo:		
elspezoj	ƒ 373.72	
kongreskotizo ktp. ..	ƒ 242.90	
		ƒ 130.82
Salajro funkciulo	ƒ 680.—	
Vojaĝkostoj	ƒ 165.40	
Socia asekuro	ƒ 52.60	
	ƒ 898.—	
Repago salajro L.S. ..	ƒ 450.—	
		ƒ 448.—
Donacoj		ƒ 30.—
Instrua Servo		ƒ 29.22
Studoservo		ƒ 5.85
Dokumentado		ƒ 30.04
Propagando		ƒ 61.46
Interkontaktilo		ƒ 20.87
Konsilantaro		ƒ 4.50
Prohonorkomitato		ƒ 0.80
Literatura Komitato		ƒ 2.40
Lingva Komitato		ƒ 21.42
Diversajoj		ƒ 34.50
		ƒ 3.258.01
Profita saldo		ƒ 1.502.77
		ƒ 4.760.78

Specifoj.

Administracio	
Afranko k.t.p.	ƒ 216.06
Giro- kaj Bankkostoj	ƒ 4.32
Tramkostoj estraro	ƒ 4.62
Kontoraj bezonajoj	ƒ 93.44
	ƒ 318.44

Donacoj	
„Dico" por la dungitarokaso ..	ƒ 30.—

Bilanco je 31. 12. '45.

Kaso		ƒ 766.68
Kom. ĝiro		ƒ 652.09
Poŝtĝiro		ƒ 8.20
Amsterd. Bank		ƒ 407.55
Debitoroj		
pagota kotizo	ƒ 1.214.65	
antaŭpagoj	ƒ 138.88	
Distr. Amsterdam ..	ƒ 31.25	
		ƒ 1.384.78
Libro-Servo		
Profito	ƒ 1.500.—	
Repago salajro	ƒ 450.—	
Transkontigo	ƒ 1.273.01	
		ƒ 3.223.01
		ƒ 6.442.31

Kreditoroj	ƒ 4.736.88	
Pagota kotizo		
Distr.	ƒ 23.55	
Kontopagoj	ƒ 182.50	
Kostoj pagotaj	ƒ 34.—	
Salajro imp. k. Socia asekuro pagota	ƒ 76.67	
		ƒ 5.053.60
Donacoj		ƒ 855.86
Rezervo fondotaj sekcioj		ƒ 49.—
Profito	ƒ 1.502.77	
Malprofito pro kapitalo neg.	ƒ 1.018.92	
Kapitalo		ƒ 483.85
		ƒ 6.442.31

BORIS SIMONEONOV, SALUTO EL SOFIO

Str. Sv. Kiril i Merodi 55, Sofio, vizitinto de la 17a SAT-kongreso en Rotterdam, salutas siajn multnombrajn amikojn de la F.L.E. Mi atendas ampleksajn leterojn de miaj amikoj el Rotterdam, Vijfhuizen kaj Amsterdam.
Specialajn salutojn al la parencojn de miaj karaj mortintaj k-doj, Kroll, Meyer, Westdorp k.a.


SALUTO EL BRAZILO

Mi gratulas vin pro la rapida refaro de via asocio post la milito.
Miajn bondezirojn al ĉiuj esperantaj laboristoj en via lando.
Rio de Janeiro Antonio S. Varao

AAN ENIGE INZENDERS.

Gelieve de copy voor L.E. slechts op één kant van het papier te schrijven. Vooral duidelijk, zo mogelijk met de schrijfmachine. Papier aan twee kanten beschreven kunnen wij niet in behandeling nemen.
De afdelingsberichten bekorte men zoveel mogelijk. Men vermelde slechts datgene wat van belang is voor anderen en beperke zich slechts tot korte mededelingen voor de afdeling.

Het International Radio Maritime Committee waarvoor wij een oproep plaatsten in L.E. van 8 Jan. j.l., blijkt inmiddels opgeheven te zijn.



27ste CONGRES

20 – 21 – 22 April 1946 te

ALKMAAR

Mededelingen van het O.K.K.
Secr. Chr. v. d. Graaf
Westerweg 173 A, Heiloo

In afwijking van de gewoonte, alle bijzonderheden betreffende het congres in L.E. bekend te maken, heeft het O.K.K. zich genoodzaakt gezien zijn mededelingen omtrent prijzen van hotels, massalogies, gemeenschappelijke maaltijd, Interfratiĝvespero enz. per circulaire aan de leden te doen toekomen.

Wij nemen aan, dat alle afdelingssecretarissen en algemene leden deze hebben ontvangen. Mocht dit niet zo zijn, dan gelieve men dit zo spoedig mogelijk aan den secretaris van het O.K.K. te melden, waarna toezending alsnog volgt.

Huisvesting. Wat de overnachting in massalogies betreft, kunnen wij mededelen, dat de prijs van *f* 0.50 voor één of twee nachten op een vergissing berust. De prijs bedraagt *f* 0.50 per nacht en per persoon. Tot onze spijt kan niet voor thee of ontbijt worden gezorgd, zodat men hiervoor zelf dient te zorgen. In de stad zijn echter verschillende gelegenheden waar men tegen billijke prijs terecht kan.

Zoals wij reeds in onze circulaire vermeldden, zal waarschijnlijk ook een aantal congresgangers in Bergen moeten worden ondergebracht. Voor het geval de weersomstandigheden dusdanig mochten zijn, dat deze afstand, welke vijf kilometer bedraagt, niet te voet kan worden afgelegd, hebben wij een autobusmaatschappij bereid gevonden deze personen te vervoeren. Wij blijven echter thans nog afhankelijk van benzinetoewijzing.

Interfratiĝvespero. Wij doen ons uiterste best U iets goeds te bieden, opdat deze avond te Alkmaar U lang in herinnering zal blijven. Wij verwachten dan ook, dat een groot aantal kameraden aanwezig zal zijn.

Rondwandeling. Indien er voldoende tijd beschikbaar is, hetgeen zal afhangen van de te behandelen stof op het congres, zal een wandeling worden gemaakt langs de voornaamste bezienswaardigheden van het oude stadje Alkmaar.

Reisgelegenheid. De trein, welke circa half twee uit Amsterdam vertrekt, is des Zaterdags druk bezet door forensen, zodat voor congresgangers niet veel ruimte beschikbaar zal zijn. In verband hiermede, zullen wij pogingen in het werk stellen vanuit Amsterdam en zo mogelijk uit de richting Rotterdam extra vervoermiddelen te doen rijden.

Kameraden, meldt U zo spoedig mogelijk aan door middel van de inmiddels door uw afdelingssecretarissen ontvangen aliĝiloj. In het Aprilnummer van L.E. zullen wij U onze laatste mededelingen doen toekomen.

DE KAASSTAD VERWACHT U!!!

La Kongresurbo Alkmaar

Daŭrigo.

La Alkmara pesejo kun apuda fromaĝfoiro estas unu el la plej grandaj allogajoj de Nord-Hollando. La foiro estas vasta placo, kuŝanta laŭlonge de kanalo, sur kiu maldekstre staras la peseja konstruaĵo, kiu estas belega specimeno de malnov-hollanda arkitekturo.

Originala preĝejo, kiu nomiĝis Sankta Spiritkapelo, iu konstruaĵo el 1581a, venis en la posedo de la urbestraro, kiu ĝin sinsekve uzis por diversaj celoj, ĝis ĝi fine kiel pesejo restis destinita por la fromaĝkomerco.

La fromaĝportista korporacio ankoraŭ ĉiam honoras tre malnovajn tradiciojn. La portistoj ĉiuj vestas sin per blankaj kostumoj kaj estas dividitaj en sekciojn, koneblaj laŭ la koloro de la pajla ĉapelo, kiu kovras iliajn kapojn. Ĉiu sekcio konsistas el ses portistoj kaj ĉefo. La ĉeffunkcio estas indaĵo, kiu regule inter la portistoj estas transdonata.

Ekzistas en Alkmaar kvin sekcioj, nome la ruĝa, la blua, la verda, la flava kaj la oranĝa sekcioj. La bela urbdomo estas post peto senpage vizitebla. Kiel allogaĵo de la ĉirkaŭaĵo de Alkmaar ni ankoraŭ menciu la Alkmaran lagon, kie oni havas belan okazon por okupi sin per akva- kaj fiŝkaptsporto. Por naĝemuloj ni aldonas, ke en Alkmaar estas bonega subtegmenta naĝejo.

LA KANTO DE L'ESPERO.
(Hatikwah)

Teksto: N. Imker. Muziko: A. Perlzweig.

I.

Judoj! Kiam en la koro
Estas fid' kaj juda'ard'
Kaj al urbo de l' Doloro
Plore nia ekrigard'
Tiam, restos la espero
De l' Judar' en la anim'
Vivi sur l'amata tero
Kara Jeruŝolajim'!

II.

Judoj! Kiel ĉe ŝtonaro
De la praa sankta mur'
L' ekzilitoj tra l' amaro
Preĝas ofte en murmur'.
Tiel restos la espero
De l' Judar' en la anim'
Vivi sur l' amata tero
Nia Jeruŝolajim'.

III.

Judoj! Kiel ĉiam fluas
Ame sang' de l' Juda gent',
Kaj sur tombo patra gutas
Roso brila el arĝent',
Tiel restos la espero
De l' Judaro en estim'
Vivi sur l' amata tero,
Kie estas Palestin'.

IV.

Judoj! Kiam en la mondo
Batos kor' de l' nura id'
Ne pereos Juda Fonto,
Koro de l' Izraelid',
Ho, neniam la espero
De l' Judaro en estim'
Mortos: vivi sur la tero,
Kie estas Palestin'!

Nederlanda teksto: A. B. Kleerekoper.
Tradukis Esperantlingven Corns Delsen, Amsterdam (West).

Zuiverings-commissie.

Met betrekking tot de beschuldiging, door onze afdeling Amsterdam 2 geuit tegen P. Krijt, werd een commissie samengesteld uit drie leden, waarvan een uit L.E.E.N., een uit N.K. en een uit de Federatie. De uitslag van het onderzoek zal t.z.t. in L.E. verschijnen.

LA EKZAMENOJ en 1946

Ekzistas nun unu ekzamena komitato, konsistanta el po t r i anoj de L.E.E.N., F.L.E., N.K. kaj N.C.E.V.

Por atingi la longe sopiratan unuecon F.L.E. kaj L.E.E.N. rezignis la ekzamenadon je dimanĉo. Kompense la komitato arangos t r i ekzamenojn je Ĉielirtago kaj la ceterajn nur sabate.

La estraro konsistas el: F. Faulhaber, prezidanto; P. Heilker kaj H. A. de Hoog, vicprezidantoj; Fraŭlino H. M. Mulder, sekr.-kasistino. Anoj por F.L.E.: G. J. Degenkamp kaj W. F. Kruit; por L.E.E.N.: Mr. A. J. Kalma kaj F. Weeke; por N.K.: P. G. Brand kaj Frato W. v. Zon; por N.C.E.V.: J. D. Brakel kaj J. van Spronsen.

La ekzamenoj okazos sabate: la 11an de majo en Den Haag; la 22an de junio en Eindhoven; la 13an de julio en Deventer; la 5an de oktobro en Heerlen; la 26an de oktobro en Utrecht kaj jaŭdon la 30an de majo en Amsterdam, Leeuwarden kaj Rotterdam.

La kostoj estas por ekzameno A *f* 7.50, por ekzameno B *f* 12.50. Por anoj de unu el la organizantaj asocioj kaj de **Nosobe** la kostoj estas respektive *f* 4.— kaj *f* 6.50. Oni anoncu sin 6 semajnojn antaŭ la ekzameno. La postuloj ne ŝanĝiĝis. (Vidu „Examen doen".) Detalajn informojn donos la prospekto akirebla ĉe la organizantaj asocioj.

Por la Generala Nederlanda
Esperanto-Ekzamena Komitato
H. M. MULDER, sekr.-kasistino
Zilvermeeuwstr. 29, Badhoevedorp

OP WEG NAAR HERSTEL.

Twee nieuwe afdelingen werden opgericht: in Wijdenes N.H. met aanvankelijk 13 leden. Secretaris is P. Spaan, Dijk B 173 en afd. Antwerpen 2, secretaris is k-do J. Beekmans, Patijn en Moretuslei 97, Antwerpen.

Wij heten deze nieuwe afdelingen van harte welkom in ons midden.

ESPERANTO-ELSENDOJ.

Radio-Stacio Praha XII elsendas ĉiutage je la 22.30-a horo. Ondolongo 49.92 m.

Lunde kaj jaŭde, je la 22,50-a horo. Ondolongo 470 m.

Sendu dankesprimon al: Radiostacio Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

DANKESPRIMO

La sekcio Sliedrecht de F.L.E. esprimas per ĉi tiu anonco sian dankon al „Helpkomitato por Esperantistaj Infanoj" de S.L.E.A. pro la donaco de vestaĵoj al niaj infanoj.

Vi, Svedaj gekamaradoj, pruvis per tio, ke Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ke ĝi vekas internaciajn fratsentojn.

Via helpo estas de ni alte taksata. Ĝi estas ankaŭ instigo por ni ĉiuj daŭrigi niajn laboron kaj propagandon por la disvastiĝo de nia internacia lingvo kaj nia esperanto-movado.

En la nomo de nia sekcio
W. 'T JONG
Noorderstr. 15, Sliedrecht

PASKO RENASKIĜO-REKONSTRUO
ALKMAAR

ANTAU KVIN JAROJ

La 25an de februaro 1941 okazis la unua publika kontraŭstaro al la germanaj uzurpintoj en Nederlando. En Amsterdam komenciĝis la striko. Estis la unua spontana kaj amasa montro de la malamo al la „ŝirmantoj" de la nederlanda popolo, kiel sin nomis la hitleraj triponoj.

En majo 1940 ili okupis ankaŭ Nederlandon, multon promesis al la popolo, klopodis ĝin logi al la nazia doktrino, montris sian maskon de bonvolo kaj helpemo al la „misgviditaj nederlandanoj" al la „trompitoj" de la demokratio. Publike estis belaj vortoj kaj frazoj disdiritaj malavare laŭ lerta, glata kaj fripona maniero. Intertempe komenciĝis la aranĝo de la rabado kaj subpremado, kiuj poste tiel elokvente montriĝis. La satelitoj de la nazia reĝimo pli kaj pli aktiviĝis. Kvazaŭ hazarde ili komencis provoki la homojn. Precipe la judojn ili klopodis unue trafi. Verŝajne ili opniis, ke tiuj ne apartenas al la nederlandanaro kaj ili sekve plenrajte povas provoki ilin, kaj ke la nejudoj ne sentos sin ligitaj al ili. La nederlandanoj ja estas bonhumora popolo, kaj ili jam glutis la okupadon kaj kutimiĝas submeti sin al la modestaj dekretoj. Jen do fariĝas tempo por la nederlanda satelitoj imiti siajn „grandfamajn" germanajn fratojn. Ili grupe en marŝordo eniris la judan kvartalon de Amsterdam. La 10an de februaro. Gaje kaj provoke ili kantas. Iu ŝtono rompas fenestron. Kriado.... vokado.... insultado....

Ne eblas ja, ke la „pacema" W.A. (la nederlandaj satelitoj) povas fari tion, do sekve estas judo. La nigraj soldatoj de la W.A. ja devas defendi sin. La spektaklo komenciĝas. La nigraj soldatoj de la W.A. „estas devigitaj" enpenetri la domojn de la judoj. Judoj kaj nejudoj kontraŭas tion. Ĉiuspecaj „armiloj", bastonoj kaj feraj tuboj, estas uzataj. La fifama W.A.-ano Koot restas kuŝanta sur la strato kun grava vundo. Poste li mortas.... Tian malordon la germana polico (t.n. verda polico) ne povas toleri, kaj la 23an de februaro ĝi aranĝas sian unuan grandan razion (homĉasadon). Pli ol 400 judoj viktimiĝas....

La kolero pro tio ĉe la amsterdama popolo daŭre kreskas. Iel ĝi devas esprimi sin. Koroj batas pro honesta malamo, okuloj brilas pro venĝemo.... manoj pugniĝas.... En fabrikoj kaj kontoroj, sur stratoj kaj en la hejmoj oni sentas la misterajn fantomojn, kiuj svebas tra la aero.

Pli kaj pli tiu animstato konkretiĝas en nepra volo homogena por kontraŭstari tiun abomenaĵon.

Estas la 25a de februaro.... Tra la aero ŝantomas la ordono **striku!!** La komunumaj instancoj donas la signon. Tramoj ne plu veturas, la purigistoj ne plu laboras; tio disvastiĝas; en la kontoroj la skribmaŝinoj ĉesas tiktadi, kontoristinoj kaj kontoristoj kolektiĝas ekster la kontoroj; en la fabrikoj la laboristoj same strikas, ĉie ĝi disvastiĝas ĝis en lokoj ekster Amsterdamo ĉirkaŭe....

Tion la konkerintoj „la supera popolo germana", ja ne povas toleri. Necesas subpremi ion tian per fera pugno.... Aŭtomobiloj kun armitaj policistoj brurapidas ĉiudirekten. Mangrenadoj estas ĵetitaj.... kugloj fajfas.... pafiloj pafadas.... maŝinpafiloj senskrupule kreas ordon.... Mortantoj.... Vunditoj....

Ĉu la striko konvenas aŭ malkonvenas al la germanoj? Malfacile tio estas distingebla. Per la fervoro montrita de la verda policistaro oni eble konkludas, ke ili ne malŝatas tiajn scenojn. Krei **ordon** estas ja io, pri kio speciale okupas sin la „supera popolo"; tamen la nederlanda popolo akceptis la unuan fajrobapton kaj per ĝi hardiĝas por la estonta kaj daŭra batalo.

Unu el la nederlandaj gazetoj konkludis pri la striko jene: La nederlanda popolo vekiĝis kaj ekkonsciis pri sia forto. Feliĉe, finfine publika kontraŭstaro. Amsterdamaj laboristoj defendis siajn atakitajn samurbanojn. Al ili la honoro de la unua ago en la granda kontraŭstaro. Depost la 25a de februaro la kontraŭstaro akceptis pli konkretajn formojn. Ĝi fariĝas organizita. Malrapide kaj prudente ĝi fariĝis potenco, kiu finfine savis nian popolon.

Uit de Afdelingen

AFD.: AMERSFOORT

Secr.: Vermeerstraat 16

La 28an de januaro okazis nia jarkunveno, ĉeestis la kunvenon 17 membroj (inkluzive la estraro). La jarraportoj de la sekretariino, la kasisto kaj la libroservanto estis aprobataj senrimarke.

Oni elektis kiel delegiton al la distriktokunveno k-don v. d. Kraats.

Kiel kaskontrolkomisiono estas elektitaj k-doj Koele, Doppenberg kaj Van Houten. Kiel estraranoj elektiĝis k-do Roskam, prezidanto; k-dino Poort, sekretariino; k-do Hazeleger, kasisto. K-doj de Lange, Luik, Boon kaj Poort. Sekretariino

AFD. AMSTERDAM II

Secr.: Oogststraat 17b, Oost.

La 20an de februaro nia membro B. Nieuwenhof skizis la vivon de la granda socialisto kaj kontraŭfaŝisto Dr. Henri Polak.

Dum la prelego li pritraktis i.a. la sintenon de tiu homo kontraŭ la faŝismo, lian simpation por Esperanto, lian sperton pri internaciaj kongresoj, k.t.p.

Kun vera interesiĝo, niaj membroj aŭskultis la prelegon, kaj opinias, ke eble ankaŭ aliaj sekcioj deziras scii ion pli pri tiu eminentulo. Se estas tiel, nia kamarado sendube estas preta prelegi ankaŭ por aliaj sekcioj. E.

AFD.: ENSCHEDE.

Secr.: Van Coeverdenstraat 39.

Pro cirkonstancoj neantaŭviditaj, nia jarkunveno okazis la 13an de februaro. Pro malsano de k-do de Bruin, la 2a prez. ten Bruggencate prezidis la kunvenon. El la jarraporto montriĝis ke nia grupo, post la liberiĝo, havas 33 membrojn. Aliĝis el nova kurso 8. Eksiĝis pro ia kaŭzo 4. Do ni nun havas 37 membrojn.

Pro multe da laboro eksiĝis kiel estraranoj k-doj ten Bruggencate 2a prez. kaj Piepetiet 1a sekr. Nun la estraro konsistas el k-doj de Bruin, prez.; J. Schmale, sekr.; Huisman, kas.; van de Pieterman, bibliotekisto kaj libro servanto; van Aalst, van Agen, kaj k-dino Kulhavy.

La jarkunveno estis bone vizitata. Vizitu la konversacian vesperon kaj daŭrigan kurson! Sekr.

AFD. GRONINGEN

Secr.: Nachtegaalstraat 19a.

Karaj gekamaradoj, vi ĉiuj ricevis „La Progresanto"n por konatiĝi kun ĝi. Mi estas tute certa: leginte ĝin, vi tuj abonos. Dum la tuta milito, ne eblis al ni studadi pro multaj kaŭzoj, nun vi ricevas la okazon, prenu ĝin per ambaŭ manoj. La kostoj estas ƒ 1.25 jare.

Vi ankaŭ ricevis „La Kosmopolito"n, nian iaman „Sennaciulo". Ĝi estas tre leginda kaj por ni internaciuloj nepre bezonata. Multaj el nia sekcio jam estas S.A.T.-anoj, ni atendas, ke ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ ne aniĝis, baldaŭ anoncos sin. La kotizo sumiĝas ƒ 2.50 jare. La sekr.

AFD.: ROTTERDAM I.

Secr.: 2e Res. Boezemstr. 14a.

Ĉar pro karbomanko nia klubo dum januaro kaj februaro ne kunvenis, ni organizis la 7an de febr. eksterordinaran kunvenon okaze de la rekomenco de la ĉiusemajna kunvenado.

Kiel gastoj ĉeestis „La Espero" kaj sekcio 4 a. Prezentiĝis altnivela programo. K-do Hogeboezem per simplaj vortoj faris interesan paroladon esperantlingve pri klasika muziko kaj la vivo de Beethoven, kiu estis ilustrata per gramofondiskoj. La k-doj Hayemaye deklamis poemojn. En la paŭzo ni havis kafon kaj bulkojn kun kolbaso, donaco de niaj danaj k-doj, do belega pruvo de internacia solidareco. Regis vera esperantosfero en la salono. La vespero estis sukceso kaj instiga ekzemplo por la aliaj sekcioj ankaŭ organizi komunajn klubkunvenojn. Ni atentigas la membrojn, ke dum niaj klubvesperoj ni ankaŭ studas el „La Progresanto", do estas necese ke ĉiu venu regule ĵaŭde al nia salono Rusthoflaan 53. Joh. Peterse

AFD.: ROTTERDAM III.

Secr.: Ruwaardstraat 54 B.

La 22an de januaro la IIIa sekcio okazigis sian jarkunvenon en la ejo Haringpakkerstraat 32 b.

Montriĝis el la raportoj de la sekretario kaj kasisto, ke la sekcia vivo estas sana kaj aktiva.

Reelektiĝis la estraro, kiu, post elekto de k-do J. van Tussenbroek, kiel asesoro, nun konsistas el 7 personoj. La membronombro jam superas 50; la elementa kurso, kiu komence konsistis el 27 partoprenantoj, marŝas kontentige, ankoraŭ 20 ge-kursantoj partoprenas ĝin.

Konkorde la kunveno akceptis la proponon, sekcie aliĝi al S.A.T., kiel subtenanta membro por almenaŭ dek guldenojn jare, sub la moto: „Kiu deziras fortikan kaj ageman S.A.T. aparaton, zorgu, ke ĝi ne estas ĝenata de financaj turmentoj. Sekretario.

AFD. SCHIEDAM

Secr.: Gasstraat 29.

La 6an de februaro ni havis nian jarkunvenon, kiu estis vera sukceso.

Unuafoje, dum nia ekzisto montris sin en la kaso iu profito, dank' al nia fervora kasisto.

Ankaŭ la biblioteko bone statas.

La raporto de la sekretario pritraktis la sekcian agadon dum la lastaj monatoj. Oni aprobis la agadon de la sekcia estraro, kiu reelektiĝis por la nova jaro.

La sekcio decidis jare donaci ƒ 10.— al S.A.T. Por la teatrajgrupo pli da anoj interesiĝas, tiel ke ni baldaŭ vidos la fruktojn de ĝia studado. Dum la paŭzo nia sekretario sciigis pri donaco de la danaj esperantistoj. Ĉiu ano ricevis paketon kun alte taksitaj bongustaĵoj. Ni vere sentis solidarecon internacian, kiu donis al ĝi delikatan guston.

Efektive estis stimula kunveno.

A. van Rosmalen

AFD. ZAANDAM

Secr. Schubertstraat 18

In de laatste ledenvergadering werd het bestuur gewijzigd; Dick Schoen stelde zich n.l. niet meer herkiesbaar als eerste secretaris, waarna k-do P. v. Meerendonk zich bereid verklaarde deze plaats te bezetten. Wij zijn erkentelijk voor het goede werk, dat verricht is door k-do Dick. Niettegenstaande de veelomvattende arbeid in andere culturele verenigingen, was hij te bewegen, tweede secretaris van onze afdeling te worden.

Van officiële zijde ontvingen wij nu bericht, dat de jaarvergadering van het district zal worden gehouden op 24 Maart in hotel „De Waakzaamheid" te Koog aan de Zaan. Aanvan 11 uur tot pl.m. 4 uur.

Het Federatie-congres, ditmaal in Alkmaar, zal als vanouds door talrijke leden uit onze afdeling worden bezocht. Om tot het overwinnen van de reismoeilijkheden te geraken, zijn we verplicht, op de interfratiĝvespero gebruik te maken van een grote, comfortabele auto. Men diene, om van een plaats verzekerd te zijn, zich echter hiervoor dan vroegtijdig op te geven bij het secretariaat.

Het Bestuur

For la mortpuno!

Lundon la 17-an de septembro, la tagon, en kiu antaŭ 75 jaroj la mortpuno estis abolata en Nederlando, oni fondis landan agad-komitaton kontraŭ la mortpuno, konsistantan el personoj de diversaj religiaj kaj politikaj tendencoj.
Tiuj, kiuj konsentas pri ĉi tiu celo kaj volas kunlabori, sendu sciigon kun konciza motivigo al la sekretariejo adreso:
Ned. Herv. Parochie en Noordbroek (Gron.)

La provizora komitato konsistas el: Dro. P. J. Meertens, prez.; pred. J. A. v. d. Meiden, sekr.; pred. C. W. Coolsma; Henriëtte Roland Holst; Tom Rot.

Por multaj homoj, kiuj nur laŭinstinkte juĝas kaj cetere papagas aliajn personojn, la demando estas facilanime respondebla. Por la Kristanoj, kiuj asertas kredi pri Dia Providenco kaj akceptas senkondiĉe la „dek ordonojn", por ili la afero estas same facile solvebla, ĉar la 6a ordono kategorie postulas: „Ne mortigu!" Ĉi tiujn vortojn (de Dio!) oni absolute ne povas miskompreni.
Bedaŭrinde evidente por multaj religiaj kristanoj (kalvinistoj) la afero ne estas tiel simpla, ĉar ĝuste ili defendas la mortpunon. Fakto al mi ne karigebla!
Kiel ĉio en la mondo ankaŭ la mortpuno havas siajn „por" kaj „kontraŭ". El pure humanista konsidero oni facile venas al la konkludo, ke ĉiu homo havas rajton vivi kaj ne estas respondeca pri siaj ecoj kaj karaktero. Tiel rigardante la aferon, ni ne rajtus apliki ian ajn punon. Tamen ne nur la sento devas difini la regulojn por la kunvivado. Sur la unua loko la Racio donu la direktivojn de la homaj faroj, ĉu apogate kaj plifortigate de la sento, ĉu malgraŭ la neprofunde pripensanta intuicio.
Bedaŭrinde ĉiu generacio donas denove procentaĵon da malbonanimuloj, kiuj absolute ne reagas al humanaj rezonoj, kiuj ne estas fideblaj kaj kontraŭ kiuj la socio nepre devas sin ŝirmi. Tiaj krimuloj formas daŭran danĝeron en la kunvivado, kaj racie estas ekzili ilin kaj se ili donas nur malutilon, oni povus pledi mortpunon. Tio estus la plej simpla kaj la plej malmultekosta maniero forigi krimulojn.
Sed ĉiu homo havas parencojn kaj, ĉar la nombro de la vere krimemaj individuoj estas tre malgranda, la socio povas porti la kostojn de ilia flegado en koncentrejo aŭ malliberejo.
Por ni humanistoj kaj Esperantistoj, ĉiu formo de perforto, skurĝo, turmento estas neakceptebla.
Almenaŭ laŭ mia opinio.
Kion vi pensas pri tio?

K-do Worst

Ĉi tiu artikolo jam estis kompostita kiam ni ricevis la informon, ke k-do Worst subite mortis. Red.

Esperanto *de oplossing.*

In de pers troffen wij onderstaand bericht aan, dat zeer zeker onze aandacht verdient:

Mevr. Roosevelt wil wereldtaal.

Mevrouw Eleanore Roosevelt, gedelegeerde ter U.N.O.-vergadering, heeft verklaard, dat zij aan de verenigde naties voor zal stellen een wereldtaal in te voeren.
De taalbarrière, aldus mevr. Roosevelt is zeer hinderlijk en ik hoop aan de U.N.O. voor te stellen, dat elk kind waar ook ter wereld naast de taal van zijn eigen land een tweede taal zal leren, die over de gehele wereld de zelfde zal moeten zijn.
De hoop, dat alle landen hun souvereiniteit zouden willen opgeven, achtte mevr. Roosevelt voor het ogenblik nog te idealistisch.

Het wil ons voorkomen, dat hier Esperanto de oplossing is. Na de concurrentiestrijd met verschillende andere projecten, waarvan vele het niet verder brachten dan het papier waarop zij werden geschreven, en andere dat hun naam inderdaad eens genoemd werd hier en daar, of dat er in een of ander wetenschappelijk betoog iets van gezegd werd, heeft het Esperanto in de 58 jaar van zijn bestaan niet alleen bewezen practisch bruikbaar te zijn, doch zich tevens een plaats veroverd in alle delen van de wereld, sterk genoeg om twee wereldoorlogen te overleven, sterk genoeg om haar voortbestaan te verzekeren.
Mogelijk zal men in de UNO discussiëren over wereldtaalontwerpen, mogelijk zal men in de bestudering van dit probleem (wat geen probleem meer is) de jaren voorbij laten gaan en opgaan in zeer wetenschappelijke vertogen en rapporten. Misschien neemt men nog wel eens in een heel ver verschiet het initiatief om al die taalvorsers aan een banket te nodigen. Maar ondertussen vervolgt het Esperanto zijn weg. Zij die kennis maakten met het Esperanto en met de beweging, weten, dat onweerstaanbaar haar ideaal wordt uitgedragen, dat de beweging wortel heeft geschoten in een vruchtbare bodem en dat over gans de aarde steeds weer nieuwe loten aan de stam ontspringen....
Mevrouw Roosevelt heeft in onze geest gesproken. Moge men in de UNO zich niet vermeien in negatieve besprekingen en beschouwingen, doch een open oog hebben voor de werkelijkheid. Hiermede komt men tegemoet aan datgene, wat reeds leeft in brede kringen niet alleen, doch geeft men ook blijk de realiteit te onderkennen.
Daarom heeft het plan van mevr. Roosevelt onze volle aandacht. Daarom ook moeten wij in de UNO opkomen voor het Esperanto.
Omtrent de manier hoe dit op de meest succesvolle wijze te ondernemen, dienen de Esperanto-organisaties zich te verstaan.
Deze zaak heeft onze aandacht.

ANONCO.

En la mezo de aprilo la dudek gekursanoj de la societo „Solidareco", gvidataj de k-do Boris Simeonov, aranĝos printempan letervesperon kun propaganda karaktero.
Respondo estas garantiita. Skribu al: Boris Atanasov, soc. „Solidareco", Kurorto Bankja — apud Sofio, Bulgario.

ATENTU! WALCHEREN!

Pro la fakto, ke por la rekonstruo de la digo kaj de Vlissingen, centoj da konstrulaboristoj el aliaj urboj ĉi tie laboras, la sekcio petas al la Esperantistoj inter ili sin anonci al ĉi subaj adresoj, por ke ni povu aranĝi konversacian vesperon.

J. HOUTEKAMER,
Paul Krugerstraat 64
R. SCHOEVERS, Hobeinstraat 77
A. GELJON, Scheldestraat 47

INTERNACIA KULTURO.

Organo de la Bulgara Esperantista Asocio, redaktata ekskluzive en Esperanto. Luksa eldono. Riĉe ilustrita. Celo de la revuo estas diskonigi la kulturan, socian kaj ekonomian vivojn de la Balkanaj landoj, kaj organizi amasan internacian korespondadon.
La enhavo estas diversa kaj tre interesa: Rakontoj, versaĵoj, belartaj pentraĵoj, artikoloj pri la batalo de la Balkanaj popoloj kontraŭ la faŝismo, sciigoj pri la Esperanto-movado k.a.
Nederlandanoj povas aboni la revuon ĉe la Libro-Servo de F.L.E. Postbus 8012, Amsterdam-W.
La abonprezo estas ƒ 4.— jare, por dek numeroj.

KONSTRUŜTONOJ

Pozitive!

Ni, Esperantistoj, kun ĉagreno legas la anoncojn en la jurnaloj, per kiuj la lingvoinstruistoj klopodas konvinki la publikon, ke la rusa aŭ la angla, la hispana aŭ la franca lingvoj havas belan estontecon kaj ke ĉiu progresema homo devas eklerni tiun aŭ tiun ĉi lingvon. La instruistoj, kiuj tiel alvokas la publikon al studado de naciaj lingvoj faras tion ne kun tre malbonaj intencoj, almenaŭ se ili honeste opinias, ke la rusa aŭ kiu ajn alia lingvo efektive havas multpromesan estontecon, kaj se ili ne tiel tamburadus por nura mongajno. Ĉiam denove la homoj nesciantaj estas allogitaj per tiaj reklamoj kaj ili oferas tempon, monon kaj energion por lerni la „lingvon de la estonteco". Sed feliĉe ili ĝenerale baldaŭ konstatas, ke la belaĵo, kiun la reklamistoj kredigis al ili tiel proksima, estas tre fore kaj nur akirebla — kvankam neniam entute — per peza studado por kelkaj elektitoj. Ĉu ni devas kontraŭstari la studon de naciaj lingvoj, ĉu averti niajn kolegojn studantajn aŭ studontajn la rusan, la anglan aŭ la francan? Ĉu diri al ili, ke ili perdas tempon, monon kaj energion? Tio estus negative rezonado, per kiu ni nur malmulte gajnus, ĉar la neracia naciismo, el kies plejprofundo devenas la propagando por naciaj lingvoj, ne estas privenkebla per negativismo.
Ni, Esperantistoj, devas mem uzi nian Esperanton tutmonde, ni devas montri al la publiko, ke ni, dank al Esperanto, povas libere kaj facile interkontakti kun ĉiuj nacianoj. Nur per tiu pozitiva laboro ni sukcesos venki opinion, ke al iu nacia lingvo apartenas la estonteco.

H. Sch.

INGEZONDEN

Io pri niaj Esp. ekspozicioj.

Kial kaj por kio ni organizas niajn ekspoziciojn? Unue por ne-esperantistoj, kaj due por la disvastiĝo de esperanto. Laŭ mia opinio ni nesufiĉe varie prezentas nian idealon en la ekspozicio, kaj pro tio nia celo ne estas alloga en la okuloj de la vizitantoj. Kion nun vidas ne-esperantistoj en niaj ekspozicioj, kio tiras ilian atenton? Estas por ili nelegabla materialo, tute simila al librejo. Ĉu estus ne pli bone per interŝanĝo de specialstrukturaj objektoj kun eksterlandaj Esperantistoj pli altigi la altiran forton de nia ekspozicio? Ni provu akiri ekzemple: lignajn ŝuojn, glitilojn, pipon el Gouda, Hollandan pejzaĝon kun muelejo, Volendaman aŭ Markenan pupon. Ktp. kun klarigo, kaj interŝanĝi ilin por Batakverkaĵo, Budha bildeto, dorma lignastipo de la negroj, papiliaro, Ĥina papera lanterno, ŝtono el kiu ajn lavoneljetanta monto, fotoj de la Polusa lumo k.t.p. Por ni Esperantistoj ĝi progresigas la korespondon kaj plibonigas nian ekspozician materialon. La ekspozicio pli multe montras la tendencon de la internacia vivo kaj samtempe ĝi respondas al nia idealo, Esperanto, la inter acia lingvo. Averto: ne faru de ĉi tiu sistemo, negocon. Sed faru ĝin por kaj pro Esperanto.

J. BRINKMAN,
Ano de Ni Volas Lumen.

LETERVESPERO

Esperantista klubo de S.K.F. aranĝos letervesperon la 8an de Aprilo 1946. Ni atendas leterojn kaj kartojn el ĉiuj landoj. Ĉiuj leteroj estos respondataj.
La leteroj oni povas sendi al jena adreso:
S.K.F. s ESPERANTOKLUBB
Stallmästaregården, Götenborg, Svedio

Bestuursmededelingen

Huishoudelijk reglement.

Om ruimte te sparen in L.E. besloten wij het huishoudelijk reglement niet daarin af te drukken. Aan de afdelingen hebben wij bereids enige exemplaren toegezonden ter behandeling. De leden, die zich hiervoor interesseren, kunnen een exemplaar aanvragen bij ons secretariaat.

Ons 27e congres.

De afdelingen ontvangen van het O.K.K. de aliĝilojn. Met het oog op de korte tijd, die ons nog rest voor het congres, is het wenselijk deze zo spoedig mogelijk ingevuld aan het O.K.K. te doen toekomen.

Federatie-raad.

De konsilantarantoj nemen er nota van, dat wij de Federatie-raadsvergadering een week hebben moeten vervroegen. Deze vindt plaats op 30 en 31 Maart a.s. in Krasnapolsky, Warmoesstraat 175—185 te Amsterdam. Aanvang Zaterdagavond om 19.30 uur precies, Zondagmorgen voortzetting. Einde 's middags om ongeveer 16 uur.
Opgave voor overnachten gelieve men zo spoedig mogelijk te doen toekomen aan den secretaris van het district Amsterdam, k-do G. B. Brugman, Orteliusstraat 231 huis, Amsterdam-W.

Amendementen.

De amendementen voor volgend L.E. moeten uiterlijk 25 Maart a.s. in ons bezit zijn. Dit in afwijking met onze vorige mededelingen. Met het oog daarop, dat L.E. dikwijls laat in handen van onze leden komt, hebben wij gemeend hiermede daaraan tegemoet te kunnen komen. Het is mogelijk, dat hierdoor L.E. in April een week later dan gewoonlijk zal verschijnen.

Verzending L.E.

Het bestuur is er toe over moeten gaan om een nieuwe adresseermachine te kopen, waardoor een rechtstreekse toezending aan alle leden in de toekomst weer mogelijk zal zijn. Wij moesten hiertoe wel overgaan, omdat onze oude machine absoluut ongeschikt bleek voor verder gebruik en aan de eisen, die wij aan een goede verzending moeten stellen, niet meer kan voldoen. De grote uitgaven, die wij ons hiervoor moeten getroosten, menen wij te mogen putten uit het fonds, dat spontaan door verschillende afdelingen en leden bij de wederoprichting van onze organisatie bijeen werd gebracht.

Abonnement L.E.

Door de hogere kosten, die de uitgave van ons orgaan vraagt, zien wij ons genoodzaakt de abonnementsprijs te verhogen. Deze werd vastgesteld op *f* 2.25 per jaar. Losse nummers kosten *f* 0.20.
Wij vertrouwen, dat onze abonné's begrijpen, dat wij hiertoe slechts noodgedwongen overgaan en hopen hiermede de verschijning in acht pagina's te kunnen verzekeren.

Afgevaardigden voor het congres.

Houden de afdelingen er rekening mede, dat de namen van hun afgevaardigden vroegtijdig in ons bezit komen? De opgaven moeten ondertekend zijn door voorzitter en secretaris.

Stemmenaantal.

Wij maken onze afdelingen er attent op, dat iedere afdeling zoveel stemmen heeft als het aantal leden bedraagt, waarvoor de laatste maand voor het congres is **gecontribueerd.** Men vergete dus niet de contributie vroegtijdig te voldoen.

Oproep.

Wij verzonden aan de afdelingen enige exemplaren van de „Oproep aan de Nederlandse Esperantisten" van het Centraal Comité. Men make hiervan een goed gebruik. Voorzien van het adres der resp. afdeling zal hij aangeplakt in openbare gelegenheden of verspreid onder niet-georganiseerde esperantisten zeker vruchten afwerpen.

Libro-Servo.

Hebben alle afdelingen de nieuwe catalogus van de Libro-Servo reeds ontvangen? Zoniet, meldt ons dat onverwijld.

Internacia Kulturo.

De correspondentie met Bulgarije is tijdrovend. Hoewel wij nog geen antwoord op ons schrijven ontvingen hebben wij elders in dit blad de abonnementsprijs ad *f* 4.— per jaar opgegeven. Wij menen hiertoe gerechtigd te zijn na inzage van een desbetreffende briefkaart door I.K. aan een onzer leden gezonden. Na eventuele storting bij ons L.S. van bovengenoemd bedrag zullen wij hiervan I.K. op de hoogte stellen, waarop regelmatige toezending, naar wij vertrouwen, zal plaats vinden. Omtrent ruil-abonnementen met Bulgaarse Esperantisten hebben wij nog geen verdere mededelingen ontvangen. De reeds opgegeven abonné's moeten dus nog even geduld oefenen.

Volgend L.E.

verschijnt zo mogelijk 6 April. Kopij voor dit nummer gelieve men voor 25 Maart aan ons te doen toekomen.

S.A.T.-RONDO ARNHEM

Ni kunvenos dimanĉon la 17an de marto, matene je la 10½ h. ĉe k-do Henstra, Takstraat 5.
La pritraktado pri la broŝuro „For la Neŭtralismon" de k-do Lanti estos daŭrigata.
Venu plejgrandnombre! Alpropriĝu al vi la SAT-ideojn. A. HENSTRA.

LA ROTERDAMA S.A.T.-RONDO

La marta kunveno okazos la 24an de marto en Zuider Volkshuis Brink, Tramlinio 3. K-do Faulhaber ĉi foje parolados. Komenco je la 10.30. Ĉu necesas inviti vin?

Uit de Districten

DISTRICT UTRECHT.

Secr.: Burg. Patijnlaan 158, Zeist.

La 2an de februaro okazis la unua delegitara kunveno por refondi la provincan distrikton, priparolataj estis la projekto de regularo kaj laborplano. Elektiĝis provizora estraro. La 9an de marto okazos la dua delegitara kunveno por definitive organizi la distrikton. La sekcioj kaj ĝeneralaj membroj pristudu la projektitan regularon kaj sendu amendojn al la sekretario, k-do J. Koster.
La sekcioj pagu distriktkotizon (ek de la refondo de la sekcio) al la kasisto k-do H. Hazeleger, Trompstraat 85, Amersfoort. La distrikta kotizo estas po kvin cendoj monate por ĉiu membro, kiun la sekcio havas. Por efektivigi la laborplanon ni devas koni niajn kapablajn k-dojn. Tial ni petas al la sekcioj ke ili sciigu la nomojn kaj adresojn de k-doj kiuj kapablas gvidi kursojn, prelegi, propagandi, k.t.p. *ankaŭ* se ili nun ne povas aŭ volas labori por la distrikto. Ni serĉas „kontaktpunktojn" en lokoj kie ne estas sekcio. Se vi scias nomon kaj adreson de personoj kiuj interesiĝas pri laborista esperantismo, aŭ kiu subtenas esperantopropagandon en simpatiantaj partio aŭ sindikato, vi skribu al la distrikta sekretario. Ni klopodas aranĝi B-kurson. K-doj, kiuj interesiĝas pri ĝi skribu al k-do Koster.
Ni opinias, ke konsekvencaj esperantistoj devas organizi sin ankaŭ tutmonde S. A. T. estas nia mondorganizo. Krome montriĝis, ke aktiveco por S.A.T. ankaŭ plifortigas la bonan spiriton en la sekcioj. Tial ni volas organize subteni en nia distrikto la propagandon por S.A.T. Ni serĉas aktivan S.A.T.-peranten por la tuta distrikto, kiu volas kunlabori kun la distriktestraro. v.Dk.

DISTRICT VLAANDEREN.

Secr.: Cockerillkaai 2, Antverpeno.

La distriktkunveno, anoncita en lasta L.E., okazis la 20an de januaro kaj bone fiaskis. Estas pliaj kaŭzoj kaj precipe la eraro de la sekretario (ne estas la unua fojo). La sciigo en L.E. ne donis la horon, kaj la diversaj grupoj ne aparte estis invititaj. La prezidanto ege koleris sed (kiel ĉiam) la sekretario promesis fari estonte kompletan laboron. Tiel la spirito iomete dolĉiĝis kaj la kunvenintoj bonorde pritraktis la tagordon.
La prezidanto skizis per mallonga enkonduka parolado niajn travivaĵojn depost la lasta intervidiĝo antaŭ kvin jaroj.
Ankaŭ la Willebroek-a delegito informis la kunvenon pri la grupa vivo.
La definitiva estraro konsistas el la k-doj: Willekens, prezidanto, Mortiers, Cockerillkaai 21, Antv., sekr., Bovoy, kas., kaj Van Dooren, Beeckmans, C. de Bie, J. Cautaert, Unuanime oni juĝas necese okaziĝi kiel eble plej baldaŭ novan distriktkunvenon. Ĝi okazos en Brussel la 3an de marto. Loko kaj horo ĝustatempe estos komunikataj al la grupoj.
Pri la laborplano oni ekzamenis pliajn sugestojn. Ĉiuj ĉeestantoj estas konvinkitaj pri la neceso ŝanĝi la malnovajn labormetodojn.
La kunveno ankaŭ estis ĉeestata de Valonaj kamaradoj reprezentantoj de FET. Ili estis komisiitaj proponi al ni principan kunlaboradon. La ĉefa celo estas starigo de Belga organizaĵo de lab.esp-oj. Tiu organizo plej efike povus insisti ĉe la oficialaj, partiaj, sindikataj kaj aliaj instancoj por ĉiuj eblaj ‚avantaĝoj: agnosko, mona subtenado, radio elsendo.
Pri la principo de la ideo la kunveno entuziasme kunsentis. La sekretario havos konstantan kontakton kun la valonaj gek-doj.
Fine ankaŭ por S.A.T. oni elektis lokan peranton. Estas K-do De Bie, Fr. Geelhandplaats 10, Antverpeno, kiu estas elektita.
Antaŭ ol fermi la kunsidon, la prezidanto dankis la ĉeestantojn, dirante ke oni faris bonan laboron. Rap.

NOVAJ ELDONAĴOJ.

La Forto de l' Vero de Adi. Facila legolibro (romano) por komencantoj. 64 paĝoj. Eld. Dansk Esperanto-Forlag.
Por konsideri tian legaĵon oni devas rampi en la haŭton de komencanto. Post la elementa kurso li deziras provi sian esperantan scion kaj senti, ke li jam „regas" la lingvon. En tiu rilato „La Forto de l' Vero" certe kontentigos lian deziron. En tre facila lingvo la libro prezentas skizon el la esperantista medio — kvankam ne laborista — interesanta lin seninterrompe de la komenco ĝis la fino. Bedaŭrinde aperis en ĝi diversaj eraroj, kiuj en legolibro por komencantoj estas nepre evitindaj. Nia Literatura Komitato atentigis la eldoniston pri ili, esperante, ke eventuala sekvonta eldono aperos neriproĉinda. F. F.

La esperantista studrondo. Kelkaj konsiloj por studgvidantoj de Alf Hasle, 24 paĝoj. Eld. Norvega Esperantista Ligo.
Jen nova kontribuaĵo al la solvo de la nepre solvenda, sed verŝajne neniel kontentige solvebla problemo de la grupvesperoj. Tamen ĉi tiu libreto serioze klopodas solvi ĝin. Ĝi prezentas la manieron, laŭ kiu la studrondo „Verda Fervoro" en Sandefjord sukcese studis la lingvon kaj agrabligis siajn vesperojn. Ni lernu ankaŭ de aliaj. F. F.